

Alessandra Madella

Zaozhuang-a Universitato, Ĉinio

La Esperanto-eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton en la debatoj pri lingva edukado

Resumo: El la jarcento de eksperimentoj pri la lernado de Esperanto, fakuloj ankoraŭ alte taksas tiujn de la psikologo Edward Lee Thorndike de Universitato Columbia. Liaj eksperimentoj por Internacia Helplingva Asocio (IALA) okazis de 1925 al 1931 en Novjorko kaj Novanglio. Sekvis ilin la rilata sep-jara eksperimento de Helen S. Eaton pri Esperanto-bazitaj kursoj de “General Language” (Ĝenerala Lingvo). El kio fontas la daŭra atento pri la rezultoj de Thorndike ĉe la klera publiko? Certe gravis la internacia renomo de la psikologo mem, same kiel la financa povo kaj vastaj rilatoj de Alice Vanderbilt Morris, fondintino de IALA, kiu akompanis la edukajn eksperimentojn per scienca programo de interlingvistikaj esploroj. Tamen, mi argumentas, ke la ĉefa kialo de la daŭra influo de la eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton estis ilia kapablo paroli al publiko de usonaj eduk-specialistoj kaj lingvo-instruistoj, uzante la samajn terminojn kaj aktive partoprenante en iliaj tendencoj kaj debatoj.

Ŝlosilvortoj: Esperanto; Esperanto-eksperimentoj; Edward Lee Thorndike; Helen Slocomb Eaton; Ĝenerala lingvokurso; Debatoj pri lingvo-edukado

1 Enkonduko: La retorika situacio de la eksperimentoj de IALA kaj lingva edukado

El la jarcento de eksperimentoj pri la lernfaciligo kaj facila lerneblo de Esperanto, multaj fakuloj ankoraŭ plej alte taksas la sesjarajn klopodojn de la fama psikologo Edward Lee Thorndike (1874–1949) de Universitato Columbia de Novjorko. La itala lingvisto Renato Corsetti ekzemple asertis:

Laŭ mi, la plej valida eksperimento restas tiu farita en la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento fare de la usonano Edward Thorndike, kiu konsideris pli da studotaj lingvoj kaj estis la plej objektiva, ankaŭ ĉar li mem ne estis esperantisto kaj do li povis esti senpartieca. (Madella 2023b, 162)

La plejmulto de la eksperimentoj pri Esperanto – de la cibernetikaj de Helmar Frank en Germanio (Frank 1979; kp. Madella 2023a, 75–80; 2023b, 70–74) al la freŝdataj de Angela Tellier en Britio (Tellier 2012; kp. Madella 2023a, 95–102; 2023b, 88–94) – ne povas aspiri al la sama objektiva statuso, ĉar ili estis faritaj de Esperanto-parolantoj. Tiusence ni povas kompreni la pezon por la publika opinio de la konkludoj de Thorndike en la resuma raporto pri la periodo 1930–1931 al Internacia Helplingva Asocio (International Auxiliary Language Association, mallonge IALA), kiu financis ilin:

... an average college senior or graduate in twenty hours of study will be able to understand printed and spoken Esperanto better than he understands French or German or Italian or Spanish after one hundred hours of study. Forty hours of teaching and practice will equip a pupil in Grade 7 or 8 to understand and use Esperanto as well as two hundred hours of teaching and practice will equip him in French or German.
(Falk 1999, 49-50)

(... averaĝa studento de la lasta jaro antaŭ bakalaŭriĝo aŭ bakalaŭriĝinta post dudek-hora studado kapablos kompreni skriban kaj buŝan Esperanton pli bone ol li komprenas la francan, la germanan, la italan aŭ la hispanan post cent-hora studado. Kvardek-hora instruado kaj praktikado ebligas al lernanto inter la aĝoj de dek du kaj dek kvar kompreni kaj uzi Esperanton same kiel ducent-hora instruado kaj praktikado faros pri la franca kaj la germana ...)¹

La eksperimentoj de Thorndike por IALA okazis de 1925 al 1931 helpe de lernantoj, studentoj kaj plenkreskuloj de Novjorko kaj Novanglio. Ili estis sekvataj dum almenaŭ sep jaroj de la rilataj eksperimentoj de Helen Slocomb Eaton (1887–1980), esploristino de IALA, pri Esperanto-bazitaj kursoj de “General Language” (Ĝenerala Lingvo), precipe en privataj lernejoj de la sama regiono. Eĥoj de la rezultoj de Thorndike longe troviĝis en sciencaj revuoj. Ekzemple, post pli ol jardeko la prestiĝa *Nature* ankoraŭ verkis tiel pri Otto Jespersen en lia nekologo:

He emphasized how incomparably easier it is to learn and use such a constructed language than any ethnic language, a view that has been confirmed as the result of a six-years’ test by Prof. Thorndike in the United States.
(“Otto Jespersen...” 1943)

(Li substrekis kiel nekompareble pli facile estas lerni kaj uzi tian konstruitan lingvon ol iun ajn etnan lingvon, vido konfirmata rezulte de ses-jara testado fare de Prof-ro Thorndike en Usono.)

1 Ĉiuj tradukoj estas miaj.

Ni povas nin demandi, kio estis la kialo de la daŭra atento pri la rezultoj de Thorndike ĉe la klera publiko. Pluraj respondoj povas esti donataj, de la internacia renomo de la psikologo mem al la tiama pozitivisma kulto pri objektiveco. Ni ne povas subtaksi la finanĉan povon kaj vastajn rilatojn de Alice Vanderbilt Morris, fondintino de IALA, kaj la plurkampa agado de la asocio, kiu akompanis edukajn eksperimentojn per scienca programo de interlingvistikaj esploroj. Gravis ankaŭ la atendata uzo de helplingvo por komunikiloj kaj komerco cele al monda paco. Mi argumentas, tamen, ke la ĉefa kialo de la daŭra influo de la eksperimentoj de IALA pri Esperanto estis la kapablo de Thorndike kaj Eaton paroli al publiko de usonaj edukistoj kaj lingvo-instruistoj, uzante la samajn terminojn kaj aktive partoprenante en iliaj tendencoj kaj debatoj. Ili kapablis pragmatike respondi al “retorika situacio” (Bitzer 1968) aŭ ekzistanta diskurs-kunteksto, kiu koncernis la kampon de lingvo-edukado. Ili sukcese alparolis publikojn, kiuj reuzis kaj adaptis la asertojn por siaj celoj, laŭ siaj diversaj vidoj pri la evoluo de la fako.

Almenaŭ tri studoj klopodis rekonstrui la kuntekston de la eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton. Julia Falk legas ĝin kadre de IALA kiel asocio dividita inter du kontraŭaj prioritatoj. De unu flanko, temis pri la scienca esplorado de la fundamentoj de lingvistiko, fare precipe de Edward Sapir. De la alia, estis la praktika celo de Alice Morris – subtenata de Eaton – kompari helplingvojn por elekti aŭ mem krei la plej facile uzeblan kaj instrueblan. La dua tendenco fine gajnis ene de IALA, dum lingvistoj malproksimiĝis de la ideo de helplingvo pro la profesiigo de lingvistiko kiel akademika fako. La eksperimentoj de Thorndike okazis ĝuste dum tiu mallonga tempofenestro, kiam estis ankoraŭ spaco por kunlaboro inter lingvistoj, psikologoj kaj edukistoj ene de IALA (Falk 1995).

Falk pludisvolvas tiun argumenton en sia libro pri virinoj en la historio de lingvistiko, fokusiĝante pri ilia rolo. Ŝi verkas pri la organizaj kapabloj de Morris, kiu sukcesis akiri la kunlaboron de gravulo kiel Thorndike, estro de la pova Teachers College (Instruista Fakultato) ĉe Universitato Columbia en Novjorko. Ŝi ankaŭ substrekas la rolon de Eaton, kiu disvastigis informojn pri tiuj Esperanto-eksperimentoj al la instruista komunumo, en la respektata kaj vaste legata revuo por instruistoj *Modern Language Journal* (Modernlingva revuo). Eaton mem instruis Esperanton, serĉis klasojn por la eksperimentoj en progresema lernejoj kaj disvolvis sian version de kurso pri “Ĝenerala Lingvo” – koncepto tre diskutata inter instruistoj ekde la jaroj 1920 (Falk 1999).

En mia libro (Madella 2023a, 2023b), mi montris kiel la eksperimentoj de IALA kunmetis en la figurojn de Thorndike kaj Eaton la du ĉefajn tendencojn de la tiama eduka penso en Usono. Laŭ Stephan Tomlinson, la kontribuo

al la industriigo de edukado fare de Thorndike kontrastis kun la persona atento al la kultivado de sociaj virtoj fare de John Dewey kaj la progresema movado, kiun li inspiris (Tomlinson 1997). La eduka teoriisto Henry Gordon Hullfish simile argumentas en sia disertacio de 1926, ke Thorndike plibonigis edukadon per sia objekte priskriba metodo, sed lia fokuso pri lernado kiel kutim-formado limiĝis al mekanika procezo, tro bazita sur ripetado. Male, Dewey konsideris la kutimojn kiel flekseblan organizadon de sintenoj por respondi al situacioj en diversaj kaj neantaŭvideblaj manieroj (Hullfish 1963). Tiusence, la Esperanto-eksperimentoj de Thorndike aperas kiel deziro de teknokratia kontrolo por rapide atingi gramatikan komprenon, plej bone ŝparante monon per grandaj klasoj kaj malpli spertaj instruistoj. Sed Eaton kapablis persvadi partopreni en tiuj eksperimentoj privatajn lernejojn de la floranta movado pri progresema edukado, tiel kunmetante la du malajn pedagogiajn alirojn je la praktika nivelo.

En tiu ĉi eseo, mi esploras kiel la prezentado de la eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton interagis kun la tiamaj sciencaj debatoj pri lingvo-edukado, ofertante konsilojn, alirojn aŭ perspektivojn, kiuj helpis malfermi novajn vidojn kaj praktikojn. Terminoj kiel “transfero” aŭ “orientiga”, kiuj ofte ripetigas en la sekvaj eksperimentoj pri Esperanto – de Frank tra la geedzoj Jennifer kaj Alain Bishop (1995; Madella 2023a, 92–95, 209–211; 2023b, 86–88, 195–197) al Tellier – aperas ĉi tie ankoraŭ freŝaj el teoriaj disputoj kaj akiras dank’ al tio novan profundecon. Tiu konscio de scienca renovigo estis fonto de orgojlo ankaŭ por la novjorka samideano, kiu raportis en *Amerika Esperantisto* pri vizito al la klubo fare de Thorndike kaj de lia koleginino, Laura Kennon, en Decembro 1930. Ilia prelego “Scientific Studies en Esperanto” (Sciencaj studoj en Esperanto) impresis la publikon danke al ilia senpartieca pritraktado de la temo kaj la abundaj materialoj pretigitaj de Kennon por instrui al diversaj klasoj. Sed la unua rimarko de la aŭtoro estas pli ĝenerala:

These studies will doubtless greatly affect language-teaching methods and text-books of the future because of the better knowledge that is being obtained of the psychology of language learning.

(“Esperanto Activity...” 1931, 55-56)

(Tiuj ĉi studoj nepre grande influos la metodojn de lingvo-instruado kaj la lernolibrojn de la estonto, dank’ al la pli bona kono akirata pri la psikologio de lingvo-lernado.)

Fakte, Thorndike, kiel studento de William James en Harvard kaj direktoro de prestiĝa esplor-centro en Columbia, povis aŭtoritate paroli kiel psikologo pri edukado, en la furoro pri reformemaj eksperimentoj post

la Unua Mondmilito. Tamen ne ĉiuj lingvo-instruistoj entuziasmis pri la novaj metodoj aŭ pretis akcepti sugestojn de edukistoj sen vera sperto de klasĉambra instruado. Se Falk substrekas la kontraston inter lingvistoj kaj edukistoj ene de IALA, por la tekstoj, kiujn ni ĉi tie studos, multe pli gravas la opozicio inter edukistoj/psikologoj kaj lingvo-instruistoj (ofte mem lingvistoj). Tiu konstato klarigas la kernan rolon de Eaton kiel varbistino, ĉar ŝi estis instruistino de la franca en privata mezlernejo de Novanglio, antaŭ ol iĝi esplor-asistantino de IALA. Ŝi krome estis membro de la ĵus fondita Linguistic Society of America (Lingvistika Societo de Usono). Kvankam ŝi ne havis la aŭtoritaton de Thorndike, ŝi povis intime alparoli siajn kolegojn kaj aldoni al la sciencaj datumoj la inspiran ateston de siaj surkampaj spertoj. Ŝi persone komprenis la malfacilaĵojn de lingvo-instruistoj, ĉar ŝi instruis la saman elekteblan fakon, ofte atakitan pro manko de rezultoj.

Por pruvi mian argumenton, ke la eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton estis tiel gravaj, ĉar ili plene partoprenis en siatempaj debatoj pri edukado, mi montros kiel ili kapablis prezenti siajn rezultojn al ne-esperantistaj publikoj en usonaj revuoj por instruistoj de fremdaj lingvoj. Mi detale analizos iliajn raportojn en la publikaĵoj, kie ili origine aperis. Sed mi ankaŭ komparos ilin kun la eseoj kaj materialoj kolektitaj en 1948 de Maxim Newmark en lia 740-paĝa antologio pri lingvo-instruado en Usono inter 1900 kaj 1947. Lia libro reprints gravan esplorraporton de Thorndike en la kvina ĉapitro, "Psychology of Language Learning" (Psikologio de lingvolernado), kaj diskutas la laboron de Eaton rilate al "ĝenerala lingvolernado". Ĝi ankaŭ inkludas la terminojn "artefarita lingvo" kaj "Esperanto" en sian indekson, ne nur rilate al la eksperimentoj de IALA. Tiu inkluzivemo helpas nin akiri pli larĝan bildon pri momento favora al Esperanto-eksperimentoj en usona historio. Krome, Newmark sentigas al ni la krea kolizion de ideoj en la kampo de edukado, en momento de transiro de filozofia vidpunkto al pli objektive scienca vidpunkto je la komenco de la dudeka jarcento. Ĝi montras al ni la luktojn kaj dezirojn, kiuj akompanis la transformadon de modernaj fremdlingvoj el elita instruobjekto por postaj universitataj studoj al la defio de ĝenerala edukado en superaj mezlernejoj post la Dua Mondmilito. La antologio povas do helpi nin taksu la sencon, kiun la eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton havis por siaj samtempuloj (Newmark 1948).

En la venonta sekcio, mi fokusigos pri la raporto de Thorndike "On the learning of rules in the study of a foreign language" (Pri la lernado de reguloj en la studo de fremdlingvo), kiu origine aperis en *The German Quarterly* (La germana kvaronjara revuo) kaj detale priskribas unu el liaj eksperimentoj pri la instruado de Esperanto (Thorndike 1931; Newmark 1948, 260–265). Ni povas legi deziron de teknokratia kontrolo en la sugesto de Thorndike, ke elstaraj materialoj povas efike anstataŭigi spertajn instruistojn kaj

malgrandajn klasojn. Sed la inkludo de la eseo en la antologion de Newmark montras, ke post la Dua Mondmilito la perspektivo malfermita de la konsideroj de Thorndike povis helpi alfronti la pli ĝeneralan defion devi subite instrui fremdlingvojn al multe pli da studentoj sen sufiĉa preparo kaj materialoj. Mia interpretado de la raporto esploras ankaŭ la temon de “transferoj” kiel kritikan pritraktadon de la filozofia koncepto de “mensa disciplino” fare de la tiama psikologio de edukado, kiu havis ĝuste en Thorndike unu el siaj kernaj figuroj. Liaj eksperimentoj pri Esperanto helpis lin plenumi la ĝeneralan deziron por pli “scienca” aliro fare de nova generacio de edukaj specialistoj.

2 Thorndike kaj transferoj en la lernado de Esperanto-reguloj

La raporto de Thorndike en *The German Quarterly* koncernas eksperimenton de 1930, do en la lasta fazo de liaj Esperanto-esploroj por IALA. La revuo estis lanĉita en Januaro 1928 de la *American Association of Teachers of German* (Usona Asocio de Instruistoj de la Germana), kreita en Novjorko en 1926. Ĝia redaktoro, Elijah William Bagster-Collins, verkis librojn pri la lerneja instruado de la germana kaj en 1916 lanĉis *The Modern Language Journal*, la organon de *National Federation of Modern Language Teachers* (Nacia Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj). *The German Quarterly* havis altan nivelon kiel pedagogia revuo. Ĝi estis kreata el la cindroj de la abisma falo en la instruado de la germana en usonaj lernejoj dum la Unua Mondmilito, akompanata en kelkaj kazoj de leĝa malpermeso ĝis 1923. Instruistoj de unu el la plej popularaj fakoj, pro la prestiĝo de la lingvo en internacia scienca literaturo, devis subite kaj senprezare sin recikligi kiel instruistoj de la franca aŭ hispana (Wooley 1948). Ni povas imagi, ke publiko de instruistoj, kiuj revenis post plurjara sufero al fako malpli grava ol antaŭe, povis esti aparte malferma al eksperimento pri la instruado de Esperanto fare de prestiĝa psikologo, studento de la germana antropologo Franz Boas.

Thorndike malfermas sian raporton per la aserto, ke ne estas tute klare kiel oni lernas regulojn en fremda lingvo, pro la ĉeesto de multaj esceptoj. Spertaj instruistoj havas klaran senton pri malfacilaĵoj kaj protektas studentojn de eraroj, sed ili ne kapablas kunpartigi siajn intuiciojn. Male, psikologoj emas pensi pri instruado ĝenerale, sed ili ne havas suffice da praktika sperto por facile plani la instruadon de reguloj en la latina, franca aŭ germana. Per eksperimentoj pri la instruado de Esperanto eblis observi kiel oni lernas lingvon kun malmulte da reguloj kaj sen morfologiaj esceptoj. La raporto de Thorndike aparte priskribis kvarsemajnan esploron kunlabore kun Kennon

pri sepdek ok universitataj studentoj, kiuj pasigis sep horojn kaj duonon en la studado kaj testado de Esperanto, kun speciala fokuso pri gramatikaj reguloj kaj korelativoj (Thorndike 1931, 89-90).

La eksperimento donis gravajn indikojn koncerne instruadon. Unue, ĝi klare pruvis la tendecon forgesi la lernitajn regulojn post iom da tempo, eĉ kiam ili estas facilaj kiel en Esperanto. Multe da studentoj forgesis uzi “-j” por la pluralo kaj “-n” por la akuzativo. Due, videblis interfero (negativaj transferoj) de reguloj al senrilataj kazoj, pro la ĝenerala tendenco apliki la regulon lernitan por kelkaj vortoj al ĉiuj sufiĉe similaj vortoj. Ekzemple, la artikolo “la” en Esperanto estas ne-deklinebla kiel “the” en la angla, sed studentoj erare skribis “laj” pro interfero el la pluralo de nomoj kaj adjektivoj aŭ “las” pro interfero el aliaj lingvoj. Dumviva ripetado naturalizis la kutimojn de la denaska lingvo, kvankam la menso komprenas, ke ili ne apartenas al fremdlingva sistemo. Anglalingvaj studentoj tial ofte uzas “-s” por pluralo en Esperanto, eĉ se la finaĵoj “-is”, “-as” kaj “-os” apartenas nur al ĝia verba sistemo. Laŭ Thorndike eraroj estas naturaj konsekvencoj de mensaj fortoj, kiujn oni devas kontraŭbatali per malaj fortoj. Kutima lingvo-instruado bremsas la tendencon erari, ĉar oni progresas malrapide kaj firmigas ĉiun uzon antaŭ ol enkonduki la sekvan. Sed tiaj eraroj ofte aperis en la Esperanto-eksperimento de 1930, ĉar ĝi devis enkonduki la tutan gramatikon en du, tri horoj (Thorndike 1931, 91-92).

Thorndike dediĉis finan teston al la korelativoj, ĉar kompletaj sistemoj kun observeblaj similecoj tre utilas en lingvo-instruado. Eduka psikologio celas uzi ilajn fortigajn ecojn, evitante iliajn konfuzigajn trajtojn. Esperanto utilas por tiaj eksperimentoj, ĉar ĝia sistemo de korelativoj estas tute kompleta kaj regula. Kompare kun aliaj lingvoj, ĝi prezentas la faciligajn kaj konfuzigajn trajtojn en ekstrema formo. La kvardek kvin vortoj de la tabelo de la korelativoj fortigas unu la alian, prezentas la esencon de la sistemo kaj estas facile memoreblaj. Sed ilia mallongeco kaŭzas konfuzojn, kiel en la testo videblis pri la serioj “i-” kaj “ti-”. Thorndike konsilas emfazi distingojn inter la du, ĉar la nomoj “nedefinita” kaj “indikativa” ne ŝajnas sufiĉi (Thorndike 1931, 93-94).

En la eksperimento, granda klaso, kiu studis per la materialoj bone pretigitaj por la kurso, sed sen aparta persona atento fare de la instruisto, atingis rezultojn nur iom pli malaltajn ol malgranda kontrol-grupo, kiu lernis kun sperta instruisto per la plej bonaj instru-metodoj. Thorndike konkludas, ke indas fari pli da eksperimentoj por vidi, ĉu elstare pretigitaj materialoj efikas pli ol malgrandaj klasoj kaj spertaj instruistoj, ĉar ili kostas multe malpli (Thorndike 1931, 94-95). La esploro teknokratie celis igi lingvo-edukadon pli efika por administrantoj. Sed la elekto de Newmark inkluzivi tiun raporton en sian antologion – kie ne troviĝas aliaj eseoj de

Thorndike – montras ĝian daŭran gravecon post la Dua Mondmilito, kiam fremdlingvoj iĝis unu el la ĉefaj objektoj por ĝenerala edukado por pli vastaj sociaj tavoloj. La propono de Thorndike fokusiĝi pri elstare pretigitaj materialoj povis faciligi tiun subitan ŝanĝon, por kiu ne troveblis sufiĉe da spertaj instruistoj. Tiu eblo restos konstanto en la historio de Esperanto-eksperimentoj, kiel videblis en la programo “EKPAROLI” de geedzoj Bishop en Aŭstralio en la jaroj 1990 (Bishop 1995; kp. Madella 2023a 92–93; 2023b, 86) aŭ en “Springboard to Languages” de Tellier en la jaroj 2000 (Tellier 2000; kp. Madella 2023a, 98; 2023b, 89).

Post la Dua Mondmilito la esplorraporto de Thorndike restis daŭre interesa ankaŭ pro sia fokuso pri transferoj. Ĝi verdire parolas eksplicite nur pri interferoj de reguloj el la angla aŭ aliaj lingvoj aŭ ene de Esperanto mem, nur implicate montrante, ke la nocio de posedo de la Esperanta formo “-es” estas facile rekonebla de anglalingvaj studentoj pro pozitiva transfero el la saksa genitivo. Sed la tuta temo de “transferoj” estis tre esplorata en la jaroj 1920–1930, ĉar ĝi ebligis science kritiki la koncepton de “mensa disciplino”, ligita al la instruado de la latina. Laŭ tiu antikva penso la studado de la latina gramatiko stimulis la plenan disvolvon de la fakultoj, kontribuante al la evoluo de la tuta personeco kaj al la ĝenerala progreso en aliaj fakoj. Sed tiam ekis duboj pri la efektiva helpo de la gramatika lernado de klasikaj aŭ modernaj lingvoj al la disvolvo de fakultoj kiel memoro ankaŭ rilate al aliaj fakoj. Ĉiu tia aserto nun devis esti science pruvita aŭ malpruvita. En tiu revolucio, eksperimenta psikologio ludis gravan rolon kaj Thorndike estis ĝia ĉampiono en tiu debato. Do, lia scienca studo pri la lernado de gramatikaj reguloj en Esperanto kaj la rilataj transferoj ne povis ne kapti atenton.

Kiel filo de novanglia pastro, Thorndike kredis, ke kvante mezurebla, objektiva scienco povos trovi universalajn leĝojn de homa konduto, kiuj helpas forlasi mistikismon kaj damaĝajn praktikojn en edukado. Li admiris la psikologion de William James kaj studis kun li ĉe Universitato Harvard. Sed Thorndike pli decide zorgis pri eksperimenta psikologio, por antaŭenpuŝi la transiron de spekulativa filozofio al la nova aplikata scienco (Jonchic 1966). Frua intereso pri transferoj videblas en lia esplorado pri la lern-procezoj de bestoj, kiu ekis sub James kaj portiĝis al lia disertacio ĉe Universitato Columbia. Ĝi havigis al li la postenon ĉe *Teachers College* kaj estis admirata interalie de la rusa psikologo kaj pedagogisto Lev Semenoviĉ Vygotskij, kiu tamen kritikis lian limigitan vidon pri transferoj. Thorndike disvolvis tie sian metodon de klopodoj kaj eraroj por montri kiel bestoj lernis liberiĝi el komplikaj enigmaj skatoloj. Li priskribis “stultecon” kiel centran en lernado kaj substrekis la similecon de respondoj okaze de similaj stimuloj en maniero, kiu anticipis lian intereson pri “transferoj” (Burnham 1972, 160).

Lia raporto en *The German Quarterly* disvolvas tiun aliron, fokusiĝante pri la statistika traktado de eraroj en la lernado de Esperanto fare de anglalingvaj studentoj, influitaj de ŝajnaj similecoj en sia propra lingvo.

La germanisto John Jacob Weisert de Universitato Columbia substreki la kernan rolon de Thorndike en la esplorado pri transferoj en eseo en *The German Quarterly* en 1939 kaj inkluzivigita en la antologion de Newmark en 1948 (Weisert 1939/1948). La aŭtoro prezentas la tiaman debaton pri lingvo-instruado, difinante “mensan disciplinon” kiel la filozofian doktrinon, ke trejnado en unu fako aŭ studobjekto altigas la kapablojn eĉ en senrilata fako. La teorio estis sendispute akceptata ĝis la komenco de la dudeka jarcento kaj ĝi pravigis la instruadon de la latina, dank’ al la konscia analizo de la pensaj procezoj, kiujn la studo de gramatiko aparte stimulas. Ĝuste tiam modernaj lingvoj, precipe la franca kaj la germana, komencis anstataŭi la latinan, ĉar la studo de ilia gramatiko ŝajnis havi la saman ĝenerale edukon efikon. Granda parto de la eksperimenta testado de “mensa disciplino” en psikologio en la dudekaj jaroj okazis sub la nomo de “transfer of training” (transfero de trejnado), kiu tamen ne plu konsideris ĝian supozatan efikon en la trejnado de fakultoj, kiel memoro aŭ juĝkapablo. La Unua Mondmilito, laŭ Weisert, skuis ĉiujn akceptitajn valorojn. Atomisma psikologia vido pri la specifeco de lernado anstataŭis por multaj homoj ĝeneralan mensan disciplinon. Samtempe populariĝis progresema edukado kun infan-centra instruplanado kaj kreskis la zorgo de edukistoj por praktikaj sociaj celoj. William James je la fino de la deknaŭa jarcento estis la unua, kiu eksperimentis pri mensa disciplino, konkludante, ke ekzerci memoron en unu specifa fako ne nepre helpas la fakulton ĝenerale. Sed en 1924 lia disĉiplo Thorndike antaŭenpuŝis la defion, per eksperimento pri transfero de trejnado en superaj mezlernejoj, kiu estis tuj rekonata kiel “klasika” kaj kies rezultoj estis ofte uzataj por refuti la aserton, ke lingvoj aŭ matematiko kapablas ĝenerale trejni la menson. Li fakte pruvis

that the amount of general improvement due to studies is small; that the differences between studies in respect to it are small, so that the values of studies may be decided largely by consideration of the special training which they give; and that the languages have no claim to preeminence.

(Weisert 1939/1948, 89–90)

(ke la kvanto de ĝenerala pliboniĝo dank’ al studoj estas malgranda: ke la malsamecoj inter studoj koncerne ĝin estas malgrandaj, tiel ke la valoro de la studoj povas esti decidita larĝe konsiderante la apartan trejnadon, kiun ili donas; kaj ke la lingvoj ne rajtas pretendi pri elstareco.)

Tio almenaŭ se la lingvoj estis instruataj en la tiam kutima maniero.

La American Classical League (Usona Klasika Ligo) kompreneble tuj respondis en 1926 per sia esploro, laŭdante la mensan disciplinon de la latina kontraŭ la trolibereco de progresema edukado kaj la troa fokuso pri praktika utileco. La temo estis akre debatata dum la tutaj jaroj 1920, dum kiuj lingvoinstruado estis sub granda premo pro manko de kontentigaj rezultoj. Sed la ĝenerala tendenco estis tiam mallarĝigi la koncepton de “mensa disciplino” al apartaj trajtoj, kiuj povis esti almenaŭ parte transferataj dank’ al la studo de specifa studobjekto (Weisert 1948: 90–93). En tiu kampo Esperanto ludis rolon eĉ antaŭ Thorndike. Newmark citas raporton de Alexandra Fisher (1921) pri lernofaciliga eksperimento per Esperanto cele al la lernado de la franca en Britio, substrekkante precize la psikologian rolon de transferoj kaj interferoj en ĝi (Buchanan kaj MacPhee 1948, 244–245). Gravis tiusence, ke Thorndike faris tiun studon de gramatikaj eraroj en Esperanto kadre de sia serio de eksperimentoj por IALA, kiuj celis interalie pruvi la lernofaciligon de Esperanto rilate al aliaj lingvoj kaj al la pli bona kompreno de la denaska angla. Kiel ni vidos en la sekva sekcio, Eaton substrekkis precipe tiun ĉi propedeŭtikan aspekton en siaj eseoj pri ĝenerala lingvolernado, prezentante Esperanton kiel latin-devenan lingvon kaj ĝiajn eblajn pozitivajn transferojn por la studo de aliaj lingvoj.

3 Eaton kiel progresema instruistino kaj la movado por ĝenerala lingvolernado

Helen Eaton publikigis la plejmulton de siaj artikoloj en *The Modern Language Journal*, kiun la Nacia Federacio de Fremdlingvaj Instruistoj publikigis de 1916. La revuo ĉiam defendis la instruadon de la germana, kiu aparte suferis pro la milito, kaj estis vaste legata inter lingvo-instruistoj. Ĝi estis do bona loko por varbadi pri la programo de IALA kaj serĉi lernejojn por ĝiaj eksperimentoj. Pri tio temas la unua artikolo de Eaton en 1927, du jarojn post la komenco de la eksperimentoj de Thorndike. Ĝi tuj indikas sian celatan publikon:

There is a growing interest among progressive educators in the educational value of teaching an artificial language as a basis for all language study. (Eaton 1927, 87)

(Ekzistas kreskanta intereso inter progresemaj edukistoj pri la eduka valoro instrui artefaritan lingvon kiel bazon de ĉiu lingva studo.)

Fakte, la lernejoj por la eksperimentoj de Thorndike estis ofte privataj kaj apartenis al la movado de progresema edukado. Artefarita lingvo povis interesi ilin, ĉar ĝia regula strukturo ilustris al la lernantoj la funkcion de

gramatiko kaj vortfarado. Tiu mapo pli malfacile videblas en la labirinto de esceptoj de naturaj lingvoj. Latin-devena artefarita lingvo kiel Esperanto havas veran edukan valoron, ĉar ĝia logika strukturo helpas akiri tion, kion ni nun nomus metalingvistika konscio. Eaton retorike markas sian lokon en la heredaĵo de mensa disciplino de la latina per sia fokuso pri gramatikaj reguloj, sed ŝi ankaŭ substrekas la simplecon de la procezo en la kazo de artefarita lingvo (Eaton 1927, 87).

Eaton alloge verkas pri si mem. En kampo tute dominata de viroj kiel la scienca esplorado de pedagogiaj praktikoj, ŝi prezentas sin kiel virinon, kiu okupiĝas pri lingvistika esplorado, kreskis en diversaj eŭropaj landoj kaj post la Unua Mondmilito instruis la francan al usonaj infanoj. Ŝi subskribas kiel iama instruistino de Milton Academy – privata supera mezlernejo en Massachussets pretiga por Universitato Harvard –, nun lingvistika esplor-asistantino de IALA. Ŝia sperto en Eŭropo gravas por informi la usonan publikon, ke en pluraj lernejoj tie Esperanto estas instruata kiel “initial language course” (komenca lingvokurso), ankaŭ ĉar temas pri la sola artefarita lingvo kun abundo de manlibroj, legolibroj kaj vortaroj. La instruistoj de tiaj kursoj rakontis siajn spertojn al Pierre Bovet, direktoro de Instituto Jean-Jacques Rousseau kaj profesoro ĉe la Universitato de Ĝenevo, kiu en 1922 kunvenigis internacian konferencon por diskuti la rolon de Esperanto en lernejoj. Esperanto povas doni klarajn konceptojn pri la diversaj partoj de la frazo, ĉar malfacilas instrui la francan aŭ la germanan al anglalingvaj lernantoj, se ili ne kapablas bone distingi inter adverbo kaj adjektivo en la angla (Eaton 1927, 87–89).

Esperanto ankaŭ larĝigas la vortprovizon, tre grava aspekto kiam fremdlingva instruado baziĝis ĉefe sur la memorigado de vortoj. Ĝi helpas en la lernado de latin-devenaj vortoj, ĉar 80% el ĝia vortaro venas el ili, sed precipe la lernantoj komprenas kiel analizi vortojn laŭ iliaj komponantaj partoj kaj mem pensi kiel konstrui ilin. Tiu aktiviga punkto kaj la psikologia sento de atingo speciale ligas Esperanton al progresema pedagogio laŭ la person-centra modelo de Dewey aŭ Maria Montessori, kiel Eaton povas atesti dank’ al sia persona sperto. Heredaĵo de mensa disciplino kiel pozitiva influo sur nerilataj fakoj videblas en la intereso pri geografio, en la edukado al monda civitaneco kaj en la kapablo superi stereotipojn kontraŭ aliaj gentoj, kiel estis la japanoj por tiamaj usonaj infanoj (Eaton 1927, 89–92).

Eaton rakontas kiel ŝi mem povis observi lernejan instruadon de Esperanto en Britio, kiu sukcese faciligis la lernadon de la franca kaj pensigas, ke indus instrui Esperanton por superi la ĝeneralan malkontenton pri lingvoinstruado. Ŝi substrekas sian sperton en privataj lernejoj por montri kiel Esperanto povus trovi lokon en instruplanoj, anstataŭ jaro aŭ semestro de la franca. La aĝo inter 10 kaj 12 plej taŭgas por komenci ĝian

lernadon, antaŭ ol lerni la latinan aŭ komenci gramatikan studon de alia lingvo. Tiaj eksperimentoj jam ekis ankaŭ en usonaj privataj mezlernejoj, dank' al la studentoj, kiuj sekvis someran kurson ĉe Universitato Columbia, kaj interesataj lingvoinstruistoj povus fari la samon. Eblas realigi diversajn specojn de eksperimentoj, taŭge kontrolitaj, kaj oni povas kontakti IALA por informoj kaj materialoj. Eaton fine aparte mencias sian "general Language Course with Esperanto as a basis" (ĝenerala Lingvokurso kun Esperanto kiel bazo) kiu jam ekzistis en mimeografa formo kaj kiu iĝas centra en ŝiaj sekvaj artikoloj (Eaton 1927, 93–94).

Thorndike estas persone menciita en la sekva artikolo, tri jarojn post la fino de liaj eksperimentoj por IALA, kies rezultojn Eaton rakontas, substrekkante ilian objektecon. La artikolo malfermas la unuan numeron de la jaro – granda atingo, al kiu sendube kontribuis la famo de la psikologo kaj la prestiĝo de lia Instruista Fakultato. Laŭ Thorndike merito de artefarita lingvo estas, ke ĝiaj komponantaj elementoj estas relative malmultaj kaj sufiĉe ofte ripetataj por stimuli komparon. Tio kreskigas konscion en la lernantoj pri la ĝeneralaj lingvaj taskoj kaj intereson pri la maniero, en kiu hindeŭropaj lingvoj plenumas ilin. Tiel artefarita lingvo pretigas lerni naturajn lingvojn (Eaton 1934, 1). Eaton daŭre strebas trovi lernejojn interesatajn partopreni en eksperimentoj, rakontante kiel ili plejparte okazis en privataj lernejoj, kun malgrandaj klasoj kaj selektitaj lernantoj. La rezultoj pruvis lernofaciligon rilate al aliaj lingvoj kaj progreson en la denaska lingvo. Eaton provizas objektivajn testajn rezultojn, sed ankaŭ rimarkojn de klasinstruistoj, substrekkante la avantaĝon por la plej malrapidaj lernantoj. La lernantoj studis "a general language course, using a constructed language at its basis" (ĝeneralan lingvokurson, uzantan konstruitan lingvon kiel sian bazon). Temas pri lernolibro, kiun Eaton speciale pretigis por la eksperimentoj. La enkonduko prezentas en la angla la abstraktan ideon de ĝenerala lingvo kaj rakontas la historian evoluon de la ĉefaj eŭropaj lingvoj, dum la korpo estas rakonto en Esperanto, ĉiam prezentata kiel latin-devena lingvo (Eaton 1934, 2–3).

Bedaŭrinde la reagoj de legantoj, kiuj mislegis tiun artikolon kiel varbadon por la adopto de specifa internacia helplingvo, igis Eaton distanciĝi de Esperanto. En sia sekva eseo, ŝi skribas pri si mem:

She does not advocate the adoption of Esperanto as an international language but does advocate its use as a medium for an orientation course in language study. (Eaton 1938, 595)

(Ŝi ne rekomendas la adopton de Esperanto kiel internacia lingvo, sed ŝi rekomendas ĝian uzon kiel ilon por orientiga kurso en lingvistudado.)

Fakte, ne estis la oficiala politiko de IALA aparte promocii iun ajn internacian lingvon, sed nur studi ilin por trovi la plej taŭgan por ĝenerala adopto aŭ mem krei ĝin. La artikolo de 1943 nur montras kiel Eaton fine pretigis kurson bazitan sur vortlistoj en diversaj eŭropaj lingvoj, flankenlasante sian ĝeneralan lingvokurson surbaze de Esperanto (Eaton 1943).

Ŝia elekto de la etikedo “Ĝenerala Lingvokurso” montras, ke Eaton kapablis funde kompreni la tendencojn en la mondo de usonaj instruistoj kaj prezenti sian kontribuon en la tiamaj aktualaj terminoj. La koncepto de “Ĝenerala Lingvokurso” estis tre diskutata inter instruistoj en la malfruaj jaroj 1920, kiam edukistoj kaj psikologoj akre kritikis la mankon de atingoj de la ordinara du-jara lingvoinstruado. Ĝi naskiĝis kiel paralelo de la kurso pri Ĝenerala Scienco, kiun oni ĵus enkondukis en la progreseman instruplanon (Falk 1999, 51). Sed edukistinoj, delonge minoritataj en vira mondo, ĝin speciale brakumis en ĝiaj multaj variaĵoj. Artikolo de Lilly Lindquist por *Modern Language Journal* en 1940 rakontas la originon de la koncepto. Jam en 1918 eksperimento en Detroit anstataŭigis unu jaron de instruado de la angla per ĝenerala lingvokurso, kiel esploro por determini la kapablojn de la lernantoj pri lingvolernado. Tiu kurso portis la studon de lingvistiko al la nivelo de mezlernejoj, por komprenigi al ili la gravecon de lingvo. Ĝi altigis la konscion pri lingvo, kun lernofaciligaj efikoj, sed ĝi ankaŭ disvolvis socian konscion, helpante la akcepton de fremdlandanoj en Usono, igante la lernantojn fieraj je sia deveno kaj samtempe pli patriotaj. Laŭ Lindquist, la kurso ne restis en la klasĉambroj, sed stimulis interagojn kun aliaj studobjektoj kaj intereson en najbarejoj ekster la lernejo mem (Lindquist 1948).

En 1934 Eaton asertas, ke ĝenerala lingvokurso utilas ankaŭ kiel prognozo por selekti la studentojn, kiuj ne sukcesus en lingvolernado kaj senutile deprimiĝus (Eaton 1934, 4). Tiu ideo revenas en la artikolo de 1938, kie Eaton klopodas trankviligi la instruistojn, kiuj timas perdi laboron pro la enkonduko de tia kurso. Fakte, per ĝi ili povas veki la intereson de la lernantoj pri posta studo de naturaj lingvoj, samtempe komprenante, kiuj inter ili ne povos sukcesi kaj nur ĝenos la progreson de la aliaj. Kelkaj el tiuj ne tiom talentaj lernantoj progresos sufiĉe por povi lerni duan lingvon, sed ankaŭ la aliaj gajnos de la ĝenerala lingvokurso, ĉar ili povos kompreni kiel funkcias ilia denaska lingvo, sen devi suferi je malkuraĝigo pro lernado por ili tro malfacila (Eaton 1938, 595–597). En niaj tempoj de inkluzivemo tiu prognoza sinteno estas eble iom ŝoka, sed ankaŭ laŭ Frank kelkaj lernantoj devus nur lerni Esperanton, ĉar natura lingvo estus tro malkuraĝiga por ili, dum Esperanto ebligas jam formi kontentigajn internaciajn rilatojn.

Esperanto estis tiam uzata en enir-testo por mezuri perspektivajn kapablojn en lingvolernado ankaŭ ĉe la Ŝtata Universitato de Iowa en Usono, kiel pli akurata antaŭvidilo ol la ĝeneralaj testoj de Intelekta Kvociento (Feder 1948). Do, Eaton ne estis la sola, kiu proponis Esperanton kiel prognozon por sekva lernado. Sed multaj edukistoj ne akceptis la efikon de ĝeneralaj lingvokursoj en progresemaĵ lernejoj por antaŭvidi la sukceson en sekva lingvolernado. Ili konsideris la kurson malbona kunmeto de diversaĵoj sen scienca valoro kaj nura perdo de tempo. Wilton W. Blancké, en artikolo unue publikita en *The German Quarterly* en 1939 kaj republikigita en la antologio de Newmark en 1948, konsideris la kurson de Eaton pli serioza ol aliajn ĝeneralajn lingvokursojn kun prognoza celo, ĉar ĝia valoro estis pruvita de objektivaj testoj (Blancké 1939/1948). Sed, malgraŭ la virtoj de Esperanto, li persone kontraŭis la uzon de artefarita lingvo:

One inevitably prefers a living bloom, with all its thorns and bugs, to a synthetic flower. (Blancké 1939/1948, 346)

(Oni neeviteble preferas vivantan floron, kun ĉiuj ĝiaj dornoj kaj insektoj, al sintetika floro.)

Temas pri la sama organisma metaforo, kontraŭ kiu Sapir devis batali en la kampo de lingvistiko por akiri konsideron por siaj interlingvistikaj esploroj. Tamen Blancké estis fakte proponanta ion tre similan al Eaton, t.e. kurson, kiu povus jam esti valora en si mem ankaŭ por lernantoj ne tiom talentaj pri lingvolernado. Li nur bazigis sian proponon sur la reformulado de “ĝenerala lingvokurso” rekte kiel lingvistika kurso, sen la helpo de Esperanto. Do, li devis aparte marki sian diferencon de Eaton por povi disvolvi sian argumenton (Blancké 1948).

Tio estis la cigna kanto de “Ĝeneralaj Lingvokursoj”. Ili estis tro ligitaj al progresema edukado de privataj lernejoj kaj al la reformoj de edukistoj, kiuj substrekis plezurajn kaj personajn lernosperton pli ol penigan disciplinon, kvankam la rezulto estis laŭ multaj tro diluita kaj senutile temporaba. La sento, ke fremdlingvoj ne estis sufiĉe regataj, eksplodis en Usono, kiam ĝi eniris la Duan Mondmiliton kaj heredis la britan mondimperion sen taŭga preparo. De 1942 la intensiva programo de lingvoinstruado de la armeo, bazita sur ĝislaciga parola praktikado kun denaskuloj, ŝajnis funkcii por la novaj celoj kaj donis multe da espero al nova generacio de instruistoj pri la praktika sukceso de la fako. Universitato Columbia, kvankam ĉiam grava, ne plu estis la motoro de tiu evoluo, kiu tre rapide disvastiĝis al multe da aliaj universitatoj tra la lando. Kiel montras la antologio de Newmark, multe da entuziasmo bonvenigis tiun direkton, kiu donis novan rolon al lingvoinstruado en la

kunteksto de la altigo de la deviga lerneja aĝo. Thorndike kaj Eaton efektive faris siajn eksperimentojn pri Esperanto dum tempofenestro, kiam ili povis kapti la atenton de lingvoinstruistoj kaj de la klera publiko. La eksperimento pri baza lingvoinstruado de Eaton en 1943 ne plu uzis Esperanton, sed jam forpasis la tempo, kiam ĝi povintus esti signifoplena.

4 Konkludo

Kiam ni hodiaŭ citas la rezultojn de eksperimentoj pri la facila lerneblo kaj lernofaciligado de Esperanto, ni ofte legas ilin abstrakte, kiel se ili validus ĉiam, en kiu ajn kunteksto. Tio certe helpas la propagandon de Esperanto teni altan torĉon. Sed, se ni forgesas legi tiujn datumojn en ilia originala situacio, ni ne vere komprenas ilian valoron por iliaj samtempuloj, kiuj donis al ili pli larĝan signifon trans Esperantujo. Ni havas la gravan kontribuon de Falk rilate al la lingvistikaj debatoj ene kaj ekster IALA. Sed mankis ĝis nun retorika studo pri la signifo de la eksperimentoj de Thorndike kaj Eaton en la kunteksto de la evoluoj de la maniero paroli pri lingvoedukado fare de la homoj, kiuj profesie laboris, esploris kaj verkis pri ĝi. Mi esperas, ke mi almenaŭ parte plenigis tiun truon.

Mi montris la gravan rolon de Thorndike en la debatoj pri “mensa disciplino”, kiu en la nova scienca etoso iĝis pli ligita al specifaj transferoj ol al la plena disvolvo de la tuta homa personeco, kiel ĝi aperis dum jarcentoj rilate al la lernado de la latina. Lia studo pri la eraroj en la lernado de Esperanto akiras novan lumon ene de tiu granda debato en la psikologio de edukado. Eaton klopodis repreni kelkajn virtojn de la antikva “mensa disciplino”, kiuj malaperis en la objektiva kalkulo de transferoj, substrekkante la fakton, ke Esperanto estas “latin-devena” lingvo, helpas formi senton de mond-civitaneco kaj superi antaŭjuĝojn kontraŭ aliaj gentoj. Ŝia ĝenerala lingvokurso estis plej populara kiam ŝi uzis Esperanton kiel la bazon de sia lernolibro, ankaŭ dank’ al ŝia sinprezento kiel eŭrope edukita, sperta instruistino. La komentoj de instruistoj, kiujn ŝi citas aldone al la eksperimentoj, donas homan reliefon al ŝia rakonto kaj sentigis ŝin proksima al ŝia publiko, malgraŭ ŝia rolo ĉe IALA. Paradoxse, kiam ŝi ne plu parolis pri Esperanto kaj fokusiĝis pri frekvenc-studoj de vortaroj de naturaj lingvoj, la stelo de IALA estis falanta en la eduka panoramo. Ĝi ankaŭ malpli brilis en la lingvistika kampo, kie tamen ĝi fine produktis sian Interlingvon, ĝuste uzante la plurlingvan frekvenc-vortaron, kiun Eaton disvolvis por sia ĝenerala lingvokurso.

Mia studo kritikis kaj suplementas tiun de Falk. Mi ne samopinias, ke oni povas simple aserti, ke la interlingvistikaj studoj de IALA suferis pro la kreskanta atento pri la bezonoj de edukado ene de la asocio. Tiu tro

klara opozicio inter lingvistoj kaj lingvoinstruistoj ŝajnas simpla antaŭdato de nunaj zorgoj. Fakte, la kampo de edukado mem tiam dividiĝis inter edukistoj/psikologoj kaj lerneaj instruistoj, kiuj ofte estis lingvistoj, ĉar universitataj postenoj malmultis. Krome, oni ne povas diri kiel Falk, ke la “ĝenerala lingvokurso” de Eaton malaperis post 1934, ĉar ĝi fakte pludaŭris sub la nomo de “orientiga kurso pri lingvo” almenaŭ ĝis 1938. Ĉefe, mia perspektivo donas pli da atento al la evoluoj kaj debatoj pri edukado en la koncernaj jaroj kaj montras kiel miaj du protagonistoj – Eaton kaj Thorndike – sukcese partoprenis en ili, precipe en la jaroj, kiam iliaj esploroj rekte temis pri Esperanto.

Estus certe necese daŭrigi tiun ĉi esploradon, relegante la sekvajn eksperimentojn pri la facila lerneblo kaj lernofaciligado de Esperanto en la ŝanĝantaj retorikaj situacioj de la mondo de edukado. Mi komencis fari tiun laboron en mia libro pri lernofaciliga Esperanto (Madella 2023a, 2023b), sed mi nur sukcesis montri la pinton de la glacimonto. Estus interese pensi, ĉu vortoj kiel “transfero” kaj “orientiga”, kiuj ofte aperas en la sekvaj eksperimentoj, akiris iel malsaman signifon, kiam ili malproksimiĝis de la originaj debatoj pri edukado en la Usono en la jaroj 1920–1930 por eniri en aliajn kuntekstojn. Mi lasas tiujn gravajn taskojn al sekvaj esploroj kaj al la esperebla helpo de pliaj esploristoj, kiuj interesiĝas pri la sama direkto. Fine, indus pensi, ĉu ĝenerala lingvokurso bazita sur Esperanto povus denove havi sencon en nia nuntempo, kiam la studo de la latina iĝis eĉ pli malgrava kaj la instruado de la angla en eŭropaj landoj klopodas fariĝi kiel eble plej plezur-dona kaj bazita sur parolado kaj praktikaj agadoj. Iom malaperis la kapablo fare de instruistoj peti disciplinan studon de gramatikaj reguloj. Kiam Corsetti substreki la valoron instrui Esperanton gramatike, li estis verŝajne pensanta pri tio. Ĉiukaze tiuj forgesitaj spertoj povas alporti al ni novajn ideojn por antaŭeniri ĉiam sur la ŝultroj de gigantoj kaj tiel vidi pli malproksimen.

Bibliografio

- Bishop, Jennifer. 1995. “Ekparoli.” *Internacia Pedagogia Revuo* 25, kajero 2: 15–16.
- Bitzer, Lloyd F. 1968. “The Rhetorical Situation.” *Rhetoric and Philosophy* 1, kajero 1: 1–14.
- Blancké, Wilton W. 1939. “General Language as a Prognosis of Success in Foreign Language Study.” *The German Quarterly* 12, kajero 2: 71–80 – represo. 1948. En *Twentieth Century Language Teaching: Sources and Readings* redaktis Maxim Newmark, 343–350. New York: The Philosophical Library.

- Buchanan, Milton Alexander kaj Earle Douglas MacPhee. 1948. "Factors Affecting Learning." En *Twentieth Century Language Teaching: Sources and Readings*, redaktis Maxim Newmark, 237–247. New York: The Philosophical Library.
- Burnham, John C. 1972. "Thorndike's Puzzle Boxes." *Journal of the History of the Behavioral Sciences* 8, kajero 2: 159–167.
- Eaton, Helen S. 1927. "The Educational Value of an Artificial Language." *The Modern Language Journal* 12, kajero 2: 87–94.
- Eaton, Helen S. 1934. "Experiments in Language Learning." *The Modern Language Journal* 19, kajero 1: 1–4.
- Eaton, Helen S. 1938. "An Orientation Course in Language." *The Modern Language Journal* 22, kajero 8: 595–598.
- Eaton, Helen S. 1943. "A New Course in Basic Language." *The Modern Language Journal* 27, kajero 8: 578–581.
- "Esperanto Activity in North America." 1931. *Amerika Esperantisto / The American Esperantist* 43, kajero 3: 53–57.
- Falk, Julia S. 1995. "Words Without Grammar: Linguists and the Auxiliary Language Movement in the United States." *Language & Communication* 15, kajero 3: 241–259.
- Falk, Julia S. 1999. *Women, Language and Linguistics: Three American Stories from the First Half of the Twentieth Century*. New York: Routledge.
- Feder, Daniel D. 1948. "The Use of Iowa Placement Examination in Foreign Language Instruction." En *Twentieth Century Language Teaching: Sources and Readings*, redaktis Maxim Newmark, 473–479. New York: The Philosophical Library.
- Fisher, Alexandra. 1921. "Modern languages by way of Esperanto." *Modern Languages* 2, kajero 5–6: 179–182.
- Frank, Helmar. 1979. "La esencaj trajtoj de la Paderborna modelo por la lingvoorientig-instruado." En *Einführung in die Interlinguistik*, redaktis Tazio Carlevaro kaj Günter Lobin, 173–174. Alsbach: Leuchtturm-Verlag.
- Hullfish, Henry Gordon. 1963. "Excerpt from 'Aspects of Thorndike's Psychology in Their Relation to Educational Theory and Practice (1926).'" *Educational Theory* 13, kajero 3: 225–234.
- Joncich, Geraldine. 1966. "Complex forces and neglected acknowledgments in the making of a young psychologist: Edward L. Thorndike and his teachers." *Journal of the History of the Behavioral Science* 2, kajero 1: 43–50.
- Lindquist, Lili. 1948. "General Language." En *Twentieth Century Language Teaching: Sources and Readings*, redaktis Maxim Newmark, 338–342. New York: The Philosophical Library.
- Madella, Alessandra. 2023a. *L'esperanto: Facilità di apprendimento e aiuto nello studio di altre lingue*. Pisa: Edistudio.

- Madella, Alessandra. 2023b. *Esperanto: Facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*. Pisa: Edistudio.
- Newmark, Maxim, red. 1948. *Twentieth Century Language Teaching: Sources and Readings*. New York: The Philosophical Library.
- "Otto Jespersen and an International Auxiliary Language." 1943. *Nature* 152, kajero 9: 324.
- Tellier, Angela, red. 2012. *Esperanto as a starter language for child second-language learning in the primary school*. Barlaston: Esperanto UK.
- Thorndike, Edward Lee. 1931. "On the learning of rules in the study of a foreign language." *The German Quarterly* 4, kajero 3: 89–95.
- Tomlison, Stephan. 1997. "Edward Lee Thorndike and John Dewey on the Science of Education." *Oxford Review of Education* 23, kajero 3: 365–383.
- Weisert, John Jacob. 1939. "Foreign Languages as Mental Discipline: A Survey." *The German Quarterly* 12, kajero 2: 61–70 – represo. 1948. En *Twentieth Century Language Teaching: Sources and Readings*, redaktis Maxim Newmark, 88–97. New York: The Philosophical Library.
- Wooley, Elmer Otto. 1948. "Five Decades of German Instruction in America." En *Twentieth Century Language Teaching. Sources and Readings*, redaktis Maxim Newmark, 67–79. New York: The Philosophical Library.

Pri la aŭtoro

Alessandra Madella, el Parmo, Italio, studis Japanajn Lingvon kaj Literaturon en Italio kaj Japanio kaj doktoriĝis pri Komunikaj Studoj (Retoriko) ĉe la Universitato de Iowa en Usono. Ŝi estas profesoro de la Esperanta Fako ĉe Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio kaj aŭtoris libron pri lernofaciligita Esperanto.

Retadreso: aminafuji2@yahoo.it

ORCID-numero: 0009-0000-5541-6976

About the author

Alessandra Madella, from Parma, Italy, studied Japanese Language and Literature in Italy and Japan, and received her PhD in Communication Studies (Rhetoric) from the University of Iowa, US. She is a professor of the Esperanto Major at Zaozhuang University, China, and she wrote a book on propedeutic Esperanto.

Sull'autrice

Alessandra Madella, nata a Parma, ha studiato Lingua e Letteratura Giapponese in Italia e in Giappone e ha un dottorato in Studi sulla comunicazione (Retorica) dall'Università dell'Iowa, Stati Uniti. È professoressa del corso di laurea in Esperanto presso l'Università di Zaozhuang, Cina, e ha scritto un libro sull'esperanto propedeutico.

Thorndike and Eaton's Esperanto Experiments in the Debates on Language Education

Abstract: Out of a century of experiments on Esperanto learning, experts still highly value those of psychologist Edward Lee Thorndike of Columbia University. His experiments for the International Auxiliary Language Association (IALA) took place from 1925 to 1931 in New York and New England. These were followed by the related seven-year experiment on Esperanto-based "General Language" courses by Helen S. Eaton. Where does the lasting attention to Thorndike's results among the educated public come from? The international reputation of the psychologist himself was certainly crucial, as was the financial power and extensive connections of Alice Vanderbilt Morris, founder of IALA, which matched the educational experiments with a scientific program of interlinguistic research. However, I argue that the main reason for the lasting influence of Thorndike and Eaton's experiments was their ability to speak to an audience of American educationalists and language teachers, sharing their same terms and actively participating in their trends and debates.

Keywords: Esperanto; Esperanto experiments; Edward Lee Thorndike; Helen Slocomb Eaton; General Language course; Debates on language education.

Gli esperimenti sull'Esperanto di Thorndike e Eaton nei dibattiti sull'educazione linguistica

Riassunto: Dopo un secolo di esperimenti sull'apprendimento dell'esperanto, gli esperti apprezzano ancora particolarmente quelli dello psicologo Edward Lee Thorndike della Columbia University. I suoi esperimenti per l'International Auxiliary Language Association (IALA) si svolsero dal 1925 al 1931 a New York e nel New England, seguiti nei sette anni successivi da quello di Helen S. Eaton su corsi di "General Language" basati sull'esperanto. Da dove viene la continua attenzione ai risultati di Thorndike da parte del pubblico colto? Ebbero sicuramente una grande importanza la fama internazionale dello psicologo, così come il potere finanziario e le vaste connessioni di Alice Vanderbilt Morris, fondatrice della IALA, che accompagnava gli esperimenti didattici con un programma scientifico di ricerca interlinguistica. Tuttavia, cercherò

di dimostrare che la ragione della continua influenza degli esperimenti di Thorndike e Eaton si trova soprattutto nella loro capacità di parlare a un pubblico americano di specialisti dell'educazione e insegnanti di lingue, utilizzando gli stessi termini e partecipando attivamente alle loro tendenze e dibattiti.

Parole chiave: Esperanto; Esperimenti sull'esperanto; Edward Lee Thorndike; Helen Slocomb Eaton; Corso di lingua generale; Dibattiti sull'educazione linguistica.